



# la informilo

\*\*\*

## informbulteno pri esperanto

bulletin bilingue d'information sur l'espéranto

eldonisto:

ESPERANTO - FEDERACIO DE ORIENTA FRANCIIO

*Fédération Culturelle de l'Est pour l'Espéranto  
Maison des Jeunes et de la Culture*

27, rue de la République, 54000 NANCY F

PCK - CCP: 1997-72 W NANCY

nouvelle série

trimestriel

2<sup>e</sup> tr. 1979

N°26



abonnement

un an: 12F

UNU JARO: 12F

( 8 INTERN. KUPON. )

**ANTO....FLASH★ESPERANTO....FLASH★ESPERANTO**

## L'espéranto, langue d'avenir

Dans le cadre du congrès régional des espérantistes qui s'était tenu durant le week-end à Colmar, MM. Cancel, de la CCI, et Ludwig, professeur de langues à Munster, ont animé samedi soir un débat fort intéressant pour démontrer l'opportunité du développement de l'espéranto pour une meilleure compréhension entre les peuples.

La démonstration fut probante et chacun conçoit que le « babélisme » qui règne dans les instances internationales, n'est pas très rationnel ni très économique si l'on connaît le prix d'une traduction d'une langue à l'autre, sans même parler des subtilités linguistiques difficiles à retraduire avec exactitude et nuance. Une langue neutre s'impose et l'espéranto pourrait être cet outil, grâce auquel on pourrait éviter tout malentendu et tout sentiment de discrimination.

Les deux créateurs ont su largement développer la thèse de « l'espéranto, outil privilégié de la communication permanente entre les hommes » et ceci en présence d'espérantistes venus de tout l'est de la France. La soirée fut honorée par la présence de M. Gerrer, maire, qui a tenu à témoigner sa sympathie à

cette poignée d'idéalistes qui avaient choisi Colmar comme lieu de congrès et pour les encourager en leur noble tâche qui consiste à rapprocher les peuples par une parfaite compréhension réciproque, moyen primordial pour garantir et s'assurer la paix.

Dimanche matin, à l'issue de l'assemblée générale qui a vu le vote de motions proposant notamment l'introduction de l'espéranto dans l'enseignement secondaire, les congressistes ont été reçus au caveau de la Chambre de commerce par MM. Pierre Netter, président, et Fernand Coteleur, adjoint au maire, qui ont affirmé leur intérêt pour les efforts des espérantistes pour faciliter les échanges culturels et économiques.

Le congrès a enfin été l'occasion de l'annonce de l'insertion d'une rubrique « professeur d'espéranto » dans le fichier professionnel du prochain annuaire téléphonique du Haut-Rhin, et de deux propositions, l'une visant à traduire les documents de la Chambre de commerce, relatifs au commerce extérieur, et l'autre à réaliser un prospectus touristique sur Colmar en espéranto, prospectus qui serait diffusé auprès des espérantistes du monde entier.

*succès  
du 38<sup>ème</sup> Congrès  
Fédéral d'Espéranto  
à COLMAR*

*21-22 avril 1979*

*communiqué du  
journal  
" Dernières Nouvelles  
d'Alsace "*

deux motions importantes adoptées en congrès \*\*\* →

## RESOLUTION CONCERNANT L'ENSEIGNEMENT DE L'ESPERANTO

Les participants au 38ème Congrès de la Fédération d'Espéranto de l'EST de la FRANCE, qui s'est tenu les 21 et 22 avril à COLMAR (68)

- constatent que le "babelisme" est à l'ordre du jour dans les organisations internationales (ONU - OMS - Parlement Européen - etc...) entraînant un manque de clarté dans les débats, un ralentissement des activités et des frais de traduction considérables,
- estiment que le choix délibéré d'une langue nationale à grande diffusion ne pourrait qu'aggraver la discrimination vis-à-vis des langues minoritaires,
- que seul le choix d'une langue internationale NEUTRE, A VOCATION MONDIALE, permettrait de vaincre ces obstacles linguistiques qui nuisent à la compréhension mutuelle,
- que l'Espéranto est la seule langue vivante fondamentalement internationale qui soit facile et accessible à tous, logique et claire, parfaitement disponible pour l'expression des valeurs scientifiques, techniques, économiques et culturelles,
- rappellent que la Conférence Générale de l'UNESCO a reconnu les résultats obtenus au moyen de l'Espéranto dans les échanges intellectuels internationaux et pour le rapprochement des peuples,
- souhaitent que les représentants élus soulignent auprès des institutions locales, départementales, cantonales et nationales concernées les obstacles linguistiques à la communication internationale et favorisent l'introduction de l'Espéranto dans l'Enseignement.

## RESOLUTION CONCERNANT L'EMPLOI DE L'ESPERANTO DANS LES INSTITUTIONS EUROPEENNES

Les participants au 38ème Congrès....

- constatant l'importance des institutions européennes,
- apprenant que l'emploi de six langues de travail au Parlement Européen pose des problèmes de traduction considérables, qui ne peuvent que nuire au bon fonctionnement des institutions et à la clarté des débats,
- que l'entrée de trois nouveaux pays dans la Communauté Européenne risque, selon les responsables des services de traduction, d'entraîner la paralysie complète des institutions,
- estiment qu'une solution préconisant le choix d'une seule langue nationale conduirait à une discrimination que les représentants des autres nations ne sauraient accepter,
- que seule une langue internationale NEUTRE A VOCATION MONDIALE permettrait à chaque pays membre de conserver son identité,
- proposent que la Commission chargée d'étudier ce problème accepte d'examiner objectivement les possibilités offertes par la langue internationale ESPERANTO.



# Pour tout savoir sur l'Espéranto... Une exposition à la CCI jusqu'au 21 avril



## L'espéranto : Pour une meilleure communication entre les hommes

### ALSACE

DIMANCHE 22 AVRIL 1979

## L'Espéranto, outil privilégié de la communication permanente entre les hommes

### L'espéranto

Les espérantistes sont retrouvés en salle de la place de congrès cult.

## Congrès des esperantistes de l'Est à Colmar

# Porter la termitière dans le Babel des langues

## Trois résolutions adoptées par les esperantistes

### Congrès

# L'espéranto... au Parlement européen ?

Avec l'entrée de la Grèce, du Portugal et de l'Espagne dans la CEE, il faudra recourir aux services de jusqu'à 72 interprètes par séance, alors qu'un tiers du budget européen est déjà absorbé par les besoins de traduction. Cette double peine de l'Est n'est pas sans conséquence à Colmar.

## En marge d'un congrès régional à Colmar

« L'emploi du Parlement qui ne peut pas mener à bien les débats, affaiblit dans l'Est un responsable... »

En 1887, un oculiste polonais L. L. Zamenhof publiait le premier livre d'étude de la langue esperanto. Vivant dans une petite ville très cosmopolite, Zamenhof partait à la recherche de personnes d'ordre international, et que la conférence générale de l'UNESCO a reconnu les résultats obtenus au moyen de

d'entraîner la paralysie complète des institutions. Pour éviter la dislocation qu'entraînerait le...

## Marcel Cuené: l'espoir en l'esperanto

Les 21 et 22 avril, une soixantaine de délégués de l'Est se retrouveront en congrès à Colmar.

mar. Le thème central du débat sera la promotion de leur langue à la veille de graves décisions prises la semaine prochaine dans le « professionnel de l'annuaire téléphonique. Ce sera fait dans le prochain annuaire du Haut-Rhin et peut-être également du Bas-Rhin, avant d'être étendu à la France entière.

telles-que-voies-favorables-dans

entre les hommes). Les décisions concernant les congressistes concernent d'efforts pour obtenir un marché commun à tous les niveaux. Dans leur sens, les efforts et 340 millions de francs sont nécessaires pour encourager les efforts de M. Clonet et de M. Gerrer, maire de la ville de Colmar et de M. Netter, président de la C.C.I. Le thème sera développé par MM. Gangel, de la C.C.I. et Ludwig, professeur d'allemand à Munster. Les débats seront animés par M. Degrelle, secrétaire de la Fédération; répondront aux questions qui leur seront posées, d'émigrants de Nancy, etc...

Une centaine de personnes, dont l'objectif est de faire tomber la barrière des langues participe ce week-end à Colmar au congrès de la Fédération esperantiste de l'Est. Les travaux, qui se déroulent de bout en fin d'après-midi dans leur partie avant de déboucher sur une conférence-débat sur « L'espéranto, outil privilégié »

adjoint au maire de Colmar, M. Clonet, président de la Fédération de l'Est d'esperanto y ont assisté. M. Netter a dit son admiration pour cette poignée d'hommes qui ont encouragé les efforts de M. Clonet et de M. Gerrer, maire de la ville de Colmar et de M. Netter, président de la C.C.I. Le thème sera développé par MM. Gangel, de la C.C.I. et Ludwig, professeur d'allemand à Munster. Les débats seront animés par M. Degrelle, secrétaire de la Fédération; répondront aux questions qui leur seront posées, d'émigrants de Nancy, etc...

grands frais pour les besoins d'une session. Le thème central du débat sera la promotion de leur langue à la veille de graves décisions prises la semaine prochaine dans le « professionnel de l'annuaire téléphonique. Ce sera fait dans le prochain annuaire du Haut-Rhin et peut-être également du Bas-Rhin, avant d'être étendu à la France entière.




---

 L'ESPERANTO A LA TELEVISION FRANCAISE

Diffusée au cours de l'émission régionale de FR3-ALSACE le samedi 21 avril, cette séquence informative a remporté un réel succès. La caméra a saisi sur le vif des élèves du lycée de SELESTAT s'initiant à la langue mondiale sous la direction de M. GUEGUENIAT, professeur agrégé de Lettres et prosélyte enthousiaste de l'espéranto.

Cette démonstration concrète a prouvé de toute évidence l'intérêt incommensurable que revêtirait l'officialisation à tous les degrés de l'enseignement de la langue planifiée du Dr ZAMENHOF pour l'établissement d'une communication effective entre les peuples.




---

 L'ESPERANTO ET LES VILLES JUMEELES

C'est un fait reconnu que le succès des contacts multiples, individuels ou de groupes, établis lors du jumelage de deux cités est pour une bonne part tributaire de la connaissance réciproque des langues des deux partenaires. Conscientes de cette exigence, les deux villes jumelles de BAR-le-DUC (55) et de GRIESHEIM (RFA) organisent chaque année des cours d'allemand et de français... visités par quelques volontaires dont il faut bien admettre le courage et l'opiniâtreté.

Désireux d'apporter une solution plus simple, plus logique et plus efficace au problème, les espérantistes de BAR-le-DUC et de GRIESHEIM se sont mis d'accord pour ouvrir simultanément à la rentrée prochaine, un cours d'espéranto et ce, à la demande... d'élèves des cours d'allemand et de français! Ces cours auront lieu dans le cadre de la Volkshochschule à GRIESHEIM d'une part et dans celui du Comité de Jumelage de BAR-le-DUC d'autre part, Comité dont le rédacteur de la INFORMILO, M.P. DENIS, est Secrétaire Général.




---

 CREATION DE L'ASSOCIATION DES ESPERANTISTES SOVIETIQUES

C'est à Moscou que vient de se décider la fondation de cette Association le 14 mars dernier.

Soumise à de nombreux aléas depuis la révolution, la diffusion de l'Espéranto en Russie retrouve ainsi un caractère officiel. C'est en URSS en effet que la langue connut ses premières heures de gloire; puis survint une longue période de stagnation, voire même d'interdiction.

C'est, de fait, aux pionniers de l'espéranto qui ont jusqu'ici, contre vents et marées, conservé leur foi en cet outil unique d'intercommunication, que nous devons ce renouveau de la langue internationale dont l'un des plus ardents propagandistes fut le grand écrivain TOLSTOÏ.




---

 L'ESPERANTO EN MARCHÉ A LA SEMAINE INTERNATIONALE DE PRINTEMPS 1979  
 A LA MAISON CULTURELLE DE GRÉSILLON (49)

Comme chaque année à la même époque, des enfants de divers pays se sont rencontrés pendant une semaine à Grésillon. Cette fois ils étaient venus du Danemark (Hvidovre), de Hollande (Wormer), d'Allemagne (Hambourg) et de France (Le Mans, Hennebont, Angers, St-Jeannet, Nîmes...), soit une quarantaine en tout, accompagnés d'adultes, instituteurs ou parents.

Chaque matin ils ont suivi, selon leur niveau, l'un des trois cours dirigés par une institutrice danoise, Lis Thune, un instituteur hollandais, Pim Van Tol, et un français, Le Magadure. L'après-midi ils ont joué dans l'immense parc et la forêt proche, visité les richesses de la région... écrit et tiré leur journal!... dans une ambiance familiale et détendue.



### 3A REZOLUCIO

La ĉeestantaro:

- konsiderante, ke la nuna periodo, postvenanta la lastajn voĉdonojn por la departementaj konsilantoj, kaj la nuna verŝajna sindonemo kaj helpemo de la freŝbakitaj balotitoj, estas favoraj elementoj por grandskala, samtempa, kunordigita kampanjo,
- petas, ke UFE instrukciu ĉiujn regionajn federaciojn, por ke ili trafu siajn departementajn konsilantarojn per la teksto ellaborita en la ĉi-antaŭa 2a rezolucio,
- kredas, ke, por esti efika, la ago devas esti nepre samtempa (limigita je unu semajno) kaj antaŭi la ferian periodon,
- Pro tiuj-ĉi kialoj, rekomendas atendi la instrukciojn de UFE sekve de la LILLE-a Kongreso antaŭ ol mem fari ion ajn.

### 4A REZOLUCIO

La ĉeestantaro:

- konsiderante, ke la nuna periodo antaŭanta la estontajn voĉdonojn por la Eŭropa Parlamento estas favora por kampanjo de niaj Esperanto-Asocioj al la Eŭropaj Kandidatoj,
- Petas, ke UFE iniciatu kunagon de ĉiuj naciaj Esperanto-Asocioj al la kandidatoj je Eŭropa Parlamento,
- Opinions grava la fakton, ke ĉiuj naciaj Asocioj interkonsentu pri unu absolute SAMA teksto (kompreneble tradukita al la naciaj lingvoj) por sendi ĝin al la trafendaj individuoj kaj politikaj instancoj,
- Proponas, ke tiu teksto estu la teksto ellaborita en la unua rezolucio, kaj sendota al la nunaj partoprenantoj de la laborkunsidoj en Strasbourg.

### FUNEBRO

Forpasis nia multjara abonanto kaj subtenanto Sinjoro Gaston TURIN la 6an de marto. Ni aldonas niajn sincerajn kondolencojn al ĉiuj, kiujn dediĉis al la familio la tuta franca kaj internacia esperantistaro.

★

LA 9a AMIKECO-KONGRESO okazos la 13/17ajn de julio 1979 en OBERKIRCH, en la nigra arbaro, Germanio, survoje al Baden-Baden, 30 kilometrojn malproksime de Strasburgo...

... petu informojn kaj aliĝojn al CENTRE NATIONAL ESPERANTO-OFFICE, ORLEANS, Francio

★

STRASBURGO - Tre verŝajne la parola kurso por komencantoj, kiu nun funkcias e la kadro de la kvartala asocio ARAN, 14 rue de la Schwannau en NEUDORF NEUDORF, estos rekomencata por la lerneja jaro 1979/1980. Se sufiĉe da samideanoj tion deziras, oni povos antaŭvidi en la lokalo de tiu kvartala asocio ankaŭ renkontojn de junaj esperantistoj, perfektigan kurson aŭ eble aliajn aranĝojn.

Kontaktu pri tio Jacqueline LEPEIX, 82 av. Jean Jaurès  
67100 STRASBOURG -NEUDORF

---

 ESPERANTO-TAGO POR INFANOJ DE TOUL KAJ PONT-St-VINCENT ★

La 20an de majo 26 ĝelernantoj de Pont-St-Vincent renkontiĝis kun 10 kamaradoj de TOUL en loko situanta inter ambaŭ urboj.

La celo de tiu renkontiĝo estis koni unu la alian kaj la pliboniĝ de la internacia lingvo per ludoj en la arbaro kaj per kantoj. La vetero ne estis tre bela sed ne pluvis. Matene la ĝeinfanoj triope devis realigi tion, kio estis skribita sur papero en koverto. Ĉiu koverto estis donita de plenkreskulo (gepatroj kaj anoj de familioj GREINER-GUILLAUME) kiuj atendis la infanteamojn sur la vojeto de la arbaro.

Kelkaj infanoj ne tute komprenis. Ekz.: post la jena ordono... per peco de karbo faru al vi nigran lipharon... ni vidis infanojn, kiuj metis karbon kaj harojn en la koverton aŭ kiuj frotis siajn harojn per la peco de karbo!

Post la manĝo la lernantoj faris desegnojn nur per naturaj aĵoj. Oni trovis kelkajn belajn sukcesaĵojn. S-r<sup>o</sup> GREINER, kiu organizis la ludojn, komunikis la rezultojn de la konkurso kaj ĉiu ricevis donaceton.

Antaŭ ol forlasi nin reciproke ni kantis esperanto-lingve. Dezirante rekomenci la venontan jaron ni reveturis, kiam komencis plui... Tamen ni bele kantis!

R. GUILLAUME

---

 ★  
**KONGRESRAPORTO**

Se la tiamaj alkoholaj vaporoj de la alzaca vino ne erarigis min, mi kredas memori; ke nia federacia komitato komisiigis min raporti pri nia Colmar-a kongreso.

Por tia tasko mi sentus min nekompetenta, se mi ne estus havinta krome la honoron reprezenti nian federacion en la nacia kongreso de fino de aprilo en LILLE.

Tial mi povas atesti pri la samspiriteco kaj la samceleco de la du kongresoj en ilia etoso kaj en iliaj decidoj. Malmodeste mi emus diri, ke la Colmar-aj ideoj influis la Lille-an politikon efike. Sed pli prudente mi provu sintezi miajn Colmar-ajn kaj Lille-ajn impresojn.

Oni eble povas bedaŭri, ke nur du orientfederacianoj ĉeestis en Lille; pli vole nin ĝojigu kelkaj konstatoj.

Unue la du ĉefaj rezolucioj adoptitaj de la komitato kaj de la asembleo de UFE en LILLE estas precipe la rezolucioj de nia Federacio pri enkonduko de Esperanto en la francan instruadon kaj en la Eŭropajn instancojn. Dume interesa prelego pridebatita en Lille temis pri la lingvaj problemoj en funkciado de eŭropaj institucioj.

Due mi devas diri, ke unu el la impresoj forte sentitaj de mi en Colmar rilatas la akcepton faritan de la prezidanto de "Komerca kaj Industria Oficejo". Mi unuflanke opinias, ke oni devas gratuli kaj danki al S-r<sup>o</sup> CUENE kaj al liaj helporganizantoj. Kaj aliflanke mi taksas bona la fakton, ke dank al tio nia movado eliĝas, vidite de ekstere, el la -kompreneble ĉefa sed ne nura- lingva kaj kultura tereno kaj ke ĝi en-trudiĝas en la ne malpli gravan ekonomian ĉiutagan vivon. Nu estas dirinde, paralele al tiu Colmar-aĵo ke grava decido de la UFE-a komitato en Lille estas la kreo, interne de tiu komitato, de personaj respondecoj inter kiuj estas laŭ mi gravegaj la rilatoj kun organizoj similcelaj kiel nia movado kaj la rilatoj kun komerco kaj industrio pri kiu okupiĝos nia samfederaciano Longue Epée.

Trie duan impreson de mi forte sentitan en Colmar naskis la tre drasta kaj alloga raporto dum televida elsendo pri la reala, praktika kaj efika enkonduko de E<sup>o</sup> en lernejarajn kursojn. Ni laŭdu por lia iniciato kaj por la propaganda efiko S-anon GUEGUENIAT. Kaj ni diru, ke, aprobante la rezolucion proponitan de nia federacio, UFE-Kongreso rekomendas strebadon de ĉiuj UFE-membroj kaj federacioj por atingi kaj konvinki elektitajn reprezentantojn en departementaj konsilantaroj, naciaj asembleoj kaj tiel plu, rilate nepran neceson enkonduki Esperanton en la lernejojn.



Por daŭrigi la paralelon inter Colmar kaj Lille mi aldiru ke:

La vetero, jam sufiĉe aĉa en Colmar, estis iom pli venta, malseka kaj griza sub la Lille-a latitudo. Sed nekomprenoble same en ambaŭ urboj, "en nia kor' flagris la sunradi'!"

La kongresanoj estis akceptitaj de la vicurbestro de LILLE. Ĉi-tiu emfazis, ke "efikeco estas unu el niaj devoj, kaj despli efikaj ni estos, ju pli ni instigos politikulojn interesiĝi je nia afero". Tia ideo ja estis pridebatita en nia asembleo de Colmar. Niaj urbdomaj gastigantoj oferis al ni ĉampanvinon, kies kvalito ne estis pli malvirta ol tiu de la blanka vino de la Colmar-a Komerca Cambro, kaj kiu fariĝis por nia orgojla menso honoro farita al la nova departemento de nia orienta federacio.

Kvankam la teatra, varietea vespero en Lille estis sensacia kaj bonhumoriga dank' al la laboro de TESPAS, mi tamen emus diri, ke estis pli varbecaj kaj certe fruktodonaj la prelegoj kaj diskutoj en Colmar sabatvespere. Eĉ se la kontraŭdirojn (efike rebatitajn de ĉiuj partoprenantoj) faris subaĉetitaj samideanoj! Ni aparte prikantu la meritojn de S-an° LUDWIG kaj liajn pedagogiajn talentojn.

Pristudante la UEA-projektojn kaj satutŝanĝojn, la komitato kunvenanta en Lille aparte insistis sur punktoj rilatantaj neŭtralecon, kiuj fakte restas por ni econ fundamentan kan ne ŝanĝeblan.

UFE, antaŭzorgante la dezirojn de nia Federacio okupiĝas pri nova prezento de la revuo "FE" kaj pri pliriĉigo de la enhavo.

Fine ni notu, ke nia samideano Longue Epée estas nun vermo de nia federacio en la frukto de estraro de UFE. Kaj malgraŭ devo de la raportanto an objektiveco, li ne povas kaŝi la grandegan estimon, kiun li havas por tiu nova estrarano!

Konstatante identecon de politiko inter la du kongresoj, insistante pri la du nunaj ĉi-sekventaj temoj:

*Ago po E° en "EUROPO"*  
*Ago por E° en lernejoj,*

Ni diru kiel agi por niaj federacianoj...

1°/ kiel konsentite en Colmar la nunajn Strasbourg-ajn Eŭropajn instancojn trafos San° LUDWIG, sendante la tekston de nia la Colmar-a rezolucio.

2°/ pri la ago *por instruado en lernejo* al la francaj elektitaj reprezentantoj (deputitoj, departementaj konsilantoj, ktp) la teksto sendota aperos en la revuo "Franca Esperantisto". (Ĝi praktike estas la teksto voĉdonita en Colmar). Mi proponas, ke ĉiuj membroj, kiuj havas eblecojn aŭ rilaĵojn, sendu leteron kun la rezolucia teksto kaj siaj komentoj, kaj skribu al la sekretario kopion de sia letero kaj adreson kaj titolojn de la alsendinto, tio antaŭ la 15a de junio. Tiam la prezidanton kontaktos cele interkonsenton la sekretario, tiu lasta skribos mem al instancoj ne trafitaj (jam) de la membroj.

3°/ pri la ago al kandidatoj de "eŭropa parlamento":

- centra ago laŭ eŭropa skalo estas pristudata kaj lanĉata de S-an° CHICOT (eksteraj rilatoj en UFE) pere de E°-Eŭropa-Instituto (Cl. PIRON).

- tio komprenoble ne malhelpas, ke ĉiu el ni povos skribi al konata kandidato aŭ politikulo, sin inspirante per la konsiloj klarigitaj de samideano Rougetet en la aprila n° de "F.E."

*Claude LONGUE EPEE*

adreso de la sekretario: *Claude LONGUE EPEE*  
*allée de la ferme*  
*51230 CONNANTRE*

*Li skribos mem al:* B. STASI, deputito en Marne, PREVOTEAU, prezidanto de la departementa konsilantaro, HARDY, novelektita de D.K. de Marne, kiujn li persone konas.

---

 ★  
 POSTKONGRESAJ PRIPENSOJ

Nu, kia kongreso montriĝis plian fojon sukceso, kaj ni tion ŝuldas al niaj lokaj organizantoj. Estas malfacile citi ilin ĉiujn, sed ĉiuj partoprenintoj scias, ke plej efike agis, apud Sr° CUENE, Sr° LUDWIG kaj mi deziras citi ankaŭ S-ron CANCEL, dank' al kies helpo, la kongreso povis disvolviĝi entute en la prestiĝa kadro de la Komerca kaj Industria Cambro. Al ili kaj al al ĉiuj aliaj helpantoj iru nia varma danko!

Ŝajne la belega ekspozicio preparita de S-r° DENIS impresis la vizitantojn, inter kiujn la urbestron de Colmar sabate vespere. La lokaj aktivuloj ankaŭ vigle informis la ĵurnalistojn, mi povis kolekti ĝis nun pli ol 20 diversajn artikolojn, pli malpli longajn, plurajn kun fotoj, pri nia kongreso kaj pri E° kaj la lingvaj problemoj en la eŭropaj instancoj, ankaŭ pri niaj rezolucioj.

La televida elsendo de la sabata vespere, kiu prezentis la E°-kurson de S-r° GUEGUENIAT en Selestat certe ludis gravan rolon sed la televido ankaŭ raportis lunde matene pri niaj rezolucioj, la radio "FR3 ALSACE" raportis sabate matene kaj lunde matene, kaj RTL raportis dufoje lunde (je la 9a kaj 12a horoj). Mencio de niaj rezolucioj aperis eĉ en la gazeto "FRANCE-ANTILLES", eldono de Fort-de-France, laŭ afabla informo de S-r° KNECHT!

Nia venontjara kongreso okazos en METZ, la 26/27ajn de aprilo 1980.

Nia komitata kunveno okazis la dimanĉon posttagmeze, sed bedaŭrinde ĉeestis nur 6 komitatanoj el 15.... estas tre malfacile en tiaj kondiĉoj fari decidojn.

S-r° DEGRELLE forlasis la sekretariecon, pro troaj okupoj, ĉu profesiaj, ĉu por E° (libroservo, dua-grada perkoresponda kurso).

LA KONSISTO DE NIAJ ESTRARO KAJ KOMITATO estas nun la jena:

Prezidanto:	Jean-Paul COLNOT - 54520 LAXOU
Vicprezidanto:	Albert LIENHARDT - 68100 MULHOUSE
Sekretario:	...ĝis la fino de julio 1979, Cl. LONGUE EPEE, - 51230 CONNANTRE... ...ek de aŭgusto 1979, Edmond LUDWIG - 68140 STOSSWIHR-MÜNSTER
Redaktoro de LA INFORMILO:	Pol DENIS - 55000 BAR-le-DUC
Libroservo:	Roger DEGRELLE - 54042 NANCY
Kasisto:	André GROSSMANN-- 68390 BALDERSHEIM
Membroj:	Marcel BERGEROT - 88000 EPINAL      S-in° Marie-Thérèse MAS 54600 VILLERS lès NANCY
	Gérard GREINER - 54200 ECROUVES      S-in° Marthe NAU 57000 MONTIGNY lès METZ
	René GUILLAUME - 54550 PONT-St-VINCENT
	Jean-Luc VANOLA - 55000 BAR-le-DUC
	Dr° Jean VOLTZ - 88270 DOMPAIRE

---

 ★  
 NIA 9a STAĜO DE PAROLATA ESPERANTO...

...okazos do en Nancy la 16-17ajn de junio. Ni ankoraŭ ne estas certaj, ke ĉi-tiu bulteno aperos antaŭ tiu dato. Ĝis la 27a de majo aliĝis 40 personoj, el Germanio kaj el 7 departementoj. Verŝajne ni estos denove 60/70 partoprenont j kaj ni esperas sukceson.


Mi ŝatus tiuokaze aldoni kelkajnppersonajn vortojn. Mi estis devigata en Colmar konservi la prezidantecon de la Federacio, malgraŭ mia deziro ekŝiĝi. Dum la tuta jaro (kaj ankoraŭ pli post nia kongreso) nun konstante alvenas multaj leteroj, ĉu al la adreso de la Federacio en Nancy, ĉu al mia propra adreso. Ili temas pri la pli diversaj aferoj, kompreneble granda parto estas informpetoj, pri E° mem kaj pri niaj kursoj. Mi klopodas respondi al ĉiuj, sed tia sekretaria laboro aldoniĝas al la perkoresponda kurso mem, al la staĝoj, al loka agado por parolaj kursoj kaj kunvenoj en Nancy, ktp.



Laŭmezure kiel E° progresas, ĉiu jaro alportas al mi pli da laboro. Tiu ritmo fariĝis nun freneziga, mi estas devigata nepre limigi miajn laborojn por E° (mi opinias, ke ne eblas por mi dediĉi pli ol 600 horojn ĉiujare al E° -post 45hora semajna, profesia laboro- ĉar tio signifas 20horojn semajne dum la ĉefaj vintraj monatoj kaj pli ol 10 horojn dum la cetera jaro). Mi estas do devigata forlasi ion. La nuna (junia) staĝo estos la lasta, kiun mi organizos, ĝis mi povos forlasi la prezidantecon de la Federacio.

Mi esperas, ke bonvolemul(in)o anoncos sin por organizi la venontan staĝon (en decembro)

JP COLNOT



el nia poŝto...

Ĉar ankaŭ negativaj reagoj utilas al nia agado, ebligante ĝin plibonigi, mi volas esprimi kritikojn pri la konferenco, kiu okazis en Kolmaro sabaton la 21an de aprilo okaze de la kongreso.

La ideo organizi okaze de kongreso publikan prelegon por prezenti Esperanton al la publiko, principe estas bona... sed malefika ŝajnas al mi la maniero, per kiu oni faris tion, kaj ĉefe la peto al la kongresanoj, ke ili faru demandojn al la prelegintoj.

Tiu iom malhonesto maniero komencigi debaton estas kutima en tiaj konferencoj, kaj estas kutime bona por venigi reagojn de neaŭdacema aŭskultintaro. Sed oni devus limigi la nombron de tiaj demandoj al 2 aŭ 3, ĝis la neesperantistoj reagu, kaj oni nepre ne devus respondi demandon, se oni estas en la salono kaj ne ĉe la tablo de la parolantoj.

Okazis, ke persono, kiu demandis... poste respondis demandon metitan de alia demandinto! Tio komprenigas al la ĉeestantaro la artefaritecon de la procedo. Poste multaj personoj intervenis por diri ion favoran al Esperanto, kaj la neesperantistoj, kiuj ankoraŭ ne suspektis tion, nepre komprenis... ke estas nur esperantistoj en la salono, kaj povas senti sin ĝenataj.

La fakto, ke preskaŭ neniu, el la neesperantistoj, kiuj venis por nin aŭdi, metis demandon, venas laŭ mi de la impreso esti alvenintaj en fermitan klubon, kie iniciitoj parolas inter si pri esoteraj aferoj.

Du ekzemploj: S-r° Aunis legis, por komprenigi, ke estas vortludoj en Esperanto, tekston de Schwartz, kiu estas tre amuza... kiam ĝin oni komprenas! Nu, dirus Lapa-lisse, ke komprenis ĝin ... nur la esperantistoj de la salono. La aliaj personoj ne kaptis eĉ unu vorton, kaj nepre demandis sin, kial nur ili en la salono ne komprenis tiun simplan lingvon, kiun ŝajne komprenas la tuta salonaro! S-r° Grossmann rakontis franclingve anekdoton pri sankta Nikolao kaj citis EN ESPERANTO frazon diritan de lia filineto "sankta Nikolao malkolbasigas la infanojn...". Venis nek traduko, nek klarigo pri tiu stranga frazo, kiun neniu alia persono ol esperantisto povas kompreni. Nepre neesperantistoj multe cerbumis por kompreni, kion sankta Nikolao havas por fari kun esperanto, kaj kial la tuta ĉeestantaro ridis pri tiu tute nekomprenebla anekdoto! Fakte preskaŭ ĉiuj kongresanoj kondukis en tiu salono, kvazaŭ ili ne sciis, ke neesperantistoj ne komprenas Esperanton. Tio ne estas evidenta pruvo pri la logikeco de nia lingvo!

Se mi estus mond-civitana kolmarano konstatinte, ke ne estas bona filmo ĉe la kinetoj de Kolmaro kaj veninte pro nura scivolemo al tiu konferenco post ĝia anonco ĉe la televido, mi forirus de la salono kun la konvinko, ke la esperantistaro similas al iu stranga sekto pentekotista aŭ alia, en kies diservoj la ĉeestantoj individue konfesas sian ĝojon esti trovintaj la Veron... Tiu impreso ne konvinkus min lerni Esperanton, krom se mi estus konvinkita, sed, en tiu kazo... mi ne bezonus veni.

Tiu ideo organizi dum kongreso renkonton kun la urbanoj ne estas malbona; kiel ĉiu nova ideo ĝi bezonas iom da praktikado por alveni al sia taŭga formo. Se oni volus

rekomenci tiun sperton, mi rekomendas, ke oni sendu al la konferenco 2 taŭgajn parolantojn (tre taŭgaj estis tiuj, kiuj parolis en Kolmaro) plus se oni volas 4 aŭ 5 kongresanojn en la publiko, sed ne pli, kaj amuzu la ceteran kongresanaron per distra programo.

Eble la neesperantistoj, kiuj venus pro scivolemo, havus la impreson esti en dezerto, sed almenaŭ ili ne havus la impreson esti ĉe esotera sekto.

Jacqueline LEPEIX

---

#### EĤOJ EL LA SOGELO-KONGRESO .... STUTTGART

En la arbaro fore, aŭdigas sin kukol' - tiun kanton vi verŝajnekonas. Komence de majo, tiu printempa kukolo havis konkurentojn, eĉ seriozajn konkurantojn, ĉar plilaŭtigis la voĉojn de la kantemuloj la germana televido. Tiamaniere ĉiu sudokcidenta televido-konsumanto malkovris famkonatan ŝvaban kanton en Esperanto: "La Svaba Vagonoro", kantita de la sudokcidenta Esperantistaro okaze de la jara kongreso de SOGELO en Stuttgart.

Sed kial el fundo de l'arbaro? Nu, ĉarman lokon elektis niaj germanaj gesamideanoj, enmeze de la ĉirkaŭ-Stuttgarta /aŭ ĉu ni pli prave diruen "Stuttgarta-arbaro?" ... la Domo de la Natur-Amikoj...

Pri la etoso en Esperanto-renkontiĝo, mi ne bezonas longe paroli, ĉar kiam geamikoj renkontiĝas... Mi nur aldonu, ke zorgis pri la distra vespero samideano MATTES el MANNHEIM, kiu vojaĝigis nin tra la mondo, prezentante al ni pentrindajn pejzaĝojn... kaj tre allogajn esperantistinojn! (pri la detaloj tiurilataj, bonvolu turni vin al Mattes, kies rakonto-talento estas multe pli sugesta ol la mia!)

Alia interesa parto de la kongresa programo estis interesege prelego pri la lingvo-problemo farita de eminentaj gastoj el Hamburgo, gesinjoroj Bormann. Pri la sama temo kompreneble ankaŭ laboris la kongresanoj, kiuj, flanke de aliaj pri-ligaj aferoj decidis sendi al ĉiuj novelektotaj deputitoj (germanaj) ĉe la Eŭropa Parlamento libron de Gerard Schulz, kiu prezentas la solvon de tiu problemo pere de la Internacia Lingvo, germana titolo: *Europäische Hochsprache oder Sprachimperialismus?* Eldonisto: Bleicher-Aktuelles-Taschenbuch.

La lastan tagon, la tuta gaja rondo enaŭtobusiĝis por malkovri la ŝvaban alpon sub... aĉa pluvego. Feliĉe, la antaŭan vesperon, la laboremaj organizantoj de la kongreso, gesinjoroj Windisch jam estis prezentitaj al ni, perdiapozitive, la regionon vizitotan kaj ties florojn. Tamen, malgraŭ la pluvo ni ne hezitis enkaverniĝi /eta vojeto kaj vojaĝo rekte al la centro de la tero per krutaj malsekaj ŝtuparetoj/ kaj admiri la bluan fonton kaj la malnovan abatejon en Blaubeuren, antaŭ ol pristudi la praan historion de nia malnova planedo dank' al belega, bone konservitaj fosilioj. Finfine, antaŭ la hejmenveturado al Stuttgart, nin akceptis pastoro Burkhardt, kiu montris al ni imponan Esperanto-bibliotekon.

Jen Stuttgart, ĉiuj elaŭtobusiĝu! Ne, pri Stuttgart mi ne parolos ĉi-tie. Se tiu belega, moderna alloga, pentrinda, naturamika urbo interesas vin, vi skribu al la Turisma Oficejo, kiu sendos al vi *belegan prospekteton...* EN ESPERANTO!

Kaj tiam... ek al Stuttgart, ĉar indas la vojaĝo! Ankaŭ niaj samfederaciaj amikoj Grossmann /la tuta familio/ kaj F-in° Lepeix, kiuj ankaŭ ĉeestis, verŝajne tute ne kontraŭdiros min!

Edmond Ludwig

---


GRAY (Francio) La lokaj esperantistoj eldonis turisman faldfolion tute en E°. inter la vidindaĵoj de tiu urbo estas menciita la Nacia E°-Muzeo. La prospekto estas ricevebla kontraŭ 2 respondkuponoj ĉe:

*Esperanto-Muzeo, 67bis Fg des Perrières, 70100 GRAY*



ATTENTION! Ajoutez 2 heures à l'horaire proposé, par suite de l'heure d'été en vigueur en France actuellement.

## Esperanto en radio



Ĉiujn informojn pri radio bv. sendi al s-ro G. Larglantier (redaktoro de ĉi tiu rubriko, 29, Bd. Murat, F-75016 Paris, Francio. En la tabelo, la horoj de la disendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Pri aliaj horzonoj v. en la Jarlibro 1979, p. 68. Mallongigoj: I = informoj, P = parolado, K = kurso.

### ĈIUTAGE

**05.00-05.30** Varsovio, 200m (1502 kHz), 75.84m (3955 kHz), 50.04m (5995 kHz), 48.90m (6135 kHz), 41.27m (7270 kHz). I.P. Pola Radio, Esperanto-Redakcio, Poŝtkesto 46, PL-00950 Warszawa, Pollando.  
**15.30-16.00** Varsovio, 41.99m (7145 kHz), 31.45m (9540 kHz). I.P.  
**21.30-22.00** Varsovio, 200m (1502 kHz), 75.84m (3955 kHz), 50.04m (5995 kHz), 41.27m (7270 kHz).

### DIMANĈE

**05.45-05.55** Vieno, 48.74m (6155 kHz), aŭ 16.82m (17840 kHz). I.P. ORF, Esperanto, Postfach 700, A-1041 Wien, Aŭstrio. Ripeto de la antaŭa sabata programo.  
**11.00-11.30** Pekino, 41.00m (7315 kHz), 30.44m (9860 kHz). I. Radio Pekino, Esperanto-fako, Pekino, Popola Respubliko Ĉinio.  
**12.30-13.00** Pekino, 25.04m (11980 kHz), 19.90m (15080 kHz). I.  
**17.20-17.30** Lisbono, 19.56m (15340 kHz), 16.78m (17880 kHz). I.P. Radio Difusão Portuguesa, Esperanto, rua do Quelhas, Lisboa 1, Portugalio.  
**18.20-18.30** Lisbono, 49.79m (6025 kHz), 30.80m (9740 kHz). Kiel je 17.20.  
**20.00-20.20** Romo, 41.24m (7275 kHz), 30.90m (9710kHz), 25.42m (11800kHz). P. Radio Roma, Esperanto-Fako, Casella Postale 320, I-00100 Roma, Italio.  
**20.05-20.15** Vatikano, 196m (1530 kHz), 48.47m (6190 kHz), 41.38m (7250kHz), 31.17m (9625 kHz), 31.10m (9645kHz), 25.63m (11705 kHz), 19.84m (15120kHz). I.P. Radiovaticana, Esperanto-fako, Piazza Pia 3, I-00193 Roma, Italio.  
**20.50-21.00; 21.20-21.30; 21.50-22.00; 22.20-22.30** Lisbono, kiel je 17.20.  
**23.00-23.15** Rio de Janeiro, 214m

(1400kHz). P. Brazila Spiritisma Federacio, av. Passos 30, Rio de Janeiro, Brazilo.

### LUNDE

**00.00-01.00** Sorocaba, 278m (1080 kHz). I.K. Rádio Clube de Sorocaba, rua São Bento 190, BR-18100 Sorocaba (SP), Brazilo.  
**01.20-01.30** Lisbono, 31.14m (9635 kHz), 25.34m (11840kHz).  
**02.50-03.00** Lisbono, 25.26m (11875 kHz).  
**03.20-03.30** kaj **05.20-05.30** Lisbono, 49.79m (6025kHz), 25.14m (11935kHz), kiel dimanĉe.  
**18.00-18.15** Berno, 75.28m (3985 kHz), 48.66 (6165 kHz), 31.46m (9535kHz). P. Svisa Radio Internacia, Esperanto-Fako, CH-3000 Bern 15, Svislando.  
**22.00-22.15** Berno, 75.28m (3985 kHz), 48.66 (6165kHz), 31.46m (9535kHz), 25.60m (11720kHz), 25.27m (11870kHz), 19.69m (15235kHz), 19.60m (15305kHz).P.

### MARDE

**20.30-20.45** Ibra Radio, per ondoj de Radio Mediteranea en Malto: 31.48m (9530kHz). I. Ibra Radio AB, S-105 36 Stockholm, Svedio.  
**22.45-23.00** Zagrebo, 264m (1163 kHz).P. Radio Zagreb, Esperanto-fako, Zagreb, Jugoslavio.

### MERKREDE

**22.00-22.15** Sabadell, 203m (1475 kHz). I.K. Radio EAJ 20, Sabadell, Hispanio.

### ĴAŬDE

**06.15-06.30** Vatikano, 196m (1530 kHz), 48.47m (6190kHz), 41.38m (7250kHz), 31.17m (9625kHz), 25.61m (11715kHz), 25.55m (11740kHz), 19.84m (15120kHz), kaj M.F. 93.0 MHz, 96.5 MHz. I.P.  
**17.50-17.55** Vieno, 203m (1475kHz).I.  
**18.00-18.15** Berno, ondolongoj kiel lunde je la sama horo.  
**22.00-22.15** Berno, ondolongoj kiel lunde je la sama horo.

### VENDREDE

**20.00-20.30** Pekino, 47.85m (6270

kHz), 43.73m (6860kHz), 31.98m (9380kHz), 26.09m (11500kHz). I.  
**20.30-20.45** Valencio, 358m (836 kHz).P. La Voz de Valencia, av. del Cid 154, Valencia 14. Hispanio.

### SABATE

**11.00-11.30** Pekino, kiel dimanĉe.  
**12.00-13.00** Pekino, kiel dimanĉe.  
**16.45-16.55** Vieno, 48.74m (6155 kHz), 19.86m (15105kHz). I.P.  
**18.00-18.15** Berno, ondolongoj kiel lunde je la sama horo.  
**20.00-20.30** Pekino, kiel vendrede.  
**22.00-22.15** Berno, ondolongoj kiel lunde je la sama horo.

### GENERALA AŬDEBLECO

Ne estas eble certigi, ke iu elsendo estas aŭ ne estas kaptebla en difinita lando aŭ mondparto. Tro multe da daŭraj aŭ nedajraj cirkonstancoj influas la propagadon de ondoj: atmosfera stato, sezono, parto de la tago, geografia ĉirkaŭaĵo de la aŭskultanto, tipo de la ricevilo kaj de la eventuala anteno ktp. Jen tamen kelkaj ĝeneralaj indikoj.

- a) Direktitaj ondoj. **Berno:** 11720, 11870, 15235 kaj 15305 kHz al Afriko; 15305 kHz al Suda Ameriko; 3985, 6165 kaj 9535 kHz al Eŭropo. **Lisbono:** 15340 kaj 17880 kHz al Afriko; 9635 kaj 11840 kHz al Brazilo; 6025 kaj 11935 kHz al Norda Ameriko; 11875 kHz al Suda Ameriko; 6025 kaj 9740 kHz al Eŭropo. **Pekino:** 7315 kaj 9860 kHz al Japanio kaj Koreo; 11980 kaj 15080 kHz al Sudorienta Azio; 6270, 6860, 9380 kaj 11500 kHz al Eŭropo. **Vatikano:** 9625, 11705 kaj 15120kHz al Afriko; 6190, 7250, 9645 kaj 11715 kHz al Eŭropo.
- b) Niredirektitaj ondoj kapteblaj longdistance: **Ibra Radio, Romo, Varsovio, Vieno, Zagrebo.**
- c) Nur loka aŭskultebleco por **Rio de Janeiro, Sabadell, Sorocaba, Valencio** kaj ĉiuj disaŭdigoj per modula frekvenco (M.F.).

Viaj leteroj al la redakcioj de la Esperantaj radio-elsendoj estas la sola signo pri la populareco de tiuj elsendoj!


81.11.29



# distra angelo



## KRUCVORTENIGMO



### HORIZONTALE:

- 1 hebrea aŭ kristana festo - 2 mallongigo/  
en tiu loko - 3 dikhaŭta mambesto / kolektiva  
sufikso - 4 je la antaŭo de ŝipo / konsonanto  
- 5 arbedo, kies branĉojn oni uzas por desegni  
/ konkretiganta sufikso - 6 spirita atmosfero  
/ pli malpli najbare - 7 fame konata astronomo  
8 en tio oni preparas trinkaĵon / urba fervojeto  
9 tute ŝirmita / juda profeto (inverse)  
10 batilo kun rimenoj / ĝi restas post la disdo-  
no de la kartoj.

### VERTIKALE:

- 1 reprezento de objektoj laŭ proksimeco kaj pozicio - 2 aldonata senpere al sub-  
stantivo / montri inklino al io - 3 urbo ĉe Tigriso / pasero, kies kapo estas  
ornamita de bela plumkrono (radik, senorde) 4 duoblita konsonanto / el ĝi naski-  
ĝas birdo / franca rivero - 5 etaĝo de terciara epoko / bela prezentado, homa  
kreado (senorde) - 6 akva trifolio - 7 duoblita vokalo / difekti en pecojn /  
turni, volvi (radik.) - 8 hejtoforno / rusa dekreto - 9 de tiu tempo / mantelo  
por maskobaloj (radik.) - skandinavia monero / ago de ludantoj per ĵetkuboj.

## SOLVOJ DE LA LASTAJ ENIGMOJ

KRUCVORTENIGMO — termometro enuigi noa gemo razeno ogivo zeo eg ranido ro  
nielo diko toporo aop oleo arkado buĉi se odor ol odometro

SILABENIGMO — peranto ebono ranido ilekso nokto salmo uragano larino tribordo  
ouĝ kratago ansero joab kofro oreloj lariko etoso

Baldaŭ mi parolos esperanto-lingve... kaj Milu samingve bojos!

Sed mia eldonisto devas presi almenaŭ 10 000 ekzemplerojn kaj li  
nun estas faranta tre seriozan studaĵon de la esperantlingva  
merkato.

SKRIBU AMASE EN ESPERANTO AU NACILINGVE... AŬ AMBAŬ AL:

CASTERMAN S.A. Editeurs, rue des soeurs noires 28

B 7500 TOURNAI (Belgio) telef. + 32 69 224 141

telegraf. "Casterdim" Tournai

telekso : 57 328 Casedi

NE FORGESU INDIKI: "referenco: via letero PS.CT de la  
9 mars 1979 al S-r<sup>o</sup> André PIERARD"

subskribo: Tintin, Kuifje, Tim, Tin Tin, Tintti, Ten-Ten,  
Tantan, Tintim, Tainetaïne, Tinni, Tan Tan...

... ankaŭ mi! Bobbie, Milou, Spokie, Struppi, Snowy, Milu, Milu, Terry,  
Tobbi, Milo...

